

KOMUNIKOU

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 38-a BRAZILIO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2015 N-ro 157

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

ASOCIO LORENZ EN LA JUBILEA BRAZILA KONGRESO



En la ĉeesto de pli ol 70 samideanoj, sub la gvido de sia prezidanto, Robinson Mattos, ASOCIO LORENZ okazigis, la 27-an de Januaro 2015, la RENKONTIĜON DE LA AMIKOJ DE LORENZ, ene de la programo de la 50-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, kiu ĉi-jare realiĝis en la urbo Rio-de-Janeiro. La ĉefa temo, “ALIANCO DE LA SCIENCO KAJ DE LA RELIGIO”, estis prezentita de la samideano Elmir dos Santos Lima (sur la foto). Ankaŭ prelegis João Silva dos Santos (“Informoj pri Sperto pri Preskaŭ Morto”) kaj Dirce Sales (“Propra Sperto pri Preskaŭ Morto”). Post ĉi tiuj paroladoj, la publiko havis la oportunon klarigi la dubojn per demandoj kaj komentoj. Alia rimarkinda punkto en la evento estis la ekspozicia budo de ASOCIO LORENZ, kiu jam fariĝis rendezuo-loko de la esperantistoj dum la Brazilaj Kongresoj, kie oni ĝuis fratan kaj ĝojigan etoson. Oni ankaŭ lanĉis, dum la RENKONTIĜO, la jam tradician ALMANAKON LORENZ 2015. ★

Fonto: Programo de la Kunsido “Amikoj de Lorenz”, dum la 50-a Brazilia Kongreso de Esperanto



SIGNOJ DE L' TEMPOJ

La frateco estos la angulŝtono de la nova socia ordo; sed ne ekzistas frateco reala, solida, efektiva, se ĝi ne sidas sur neskuebla bazo. Tiu bazo estas la fido, ne la fido al tiaj aŭ aliaj apartaj dogmoj, kiuj ŝanĝiĝas kun la tempoj kaj popoloj kaj kiuj ĵetas ŝtonojn, unuj kontraŭ la aliajn, ĉar, sin reciproke anatemante, ili nutras la antagonismon; sed ja la fido al la fundamentaj principoj, kiujn ĉiu persono povas akcepti: *Dio, la animo, la estonteco, la senfina, individua progreso, la ĉiameco de la rilatoj inter la estuloj*. Kiam ĉiuj homoj estos konvinkitaj, ke Dio estas unu sama por ĉiuj; ke tiu Dio, superege justa kaj bona, nenion maljustan povas deziri; ke la malbono venas de la homoj, ne de Li, tiam ĉiuj sin rigardos filoj de unu sama Patro kaj sin reciproke donos la manojn. Nur la morala progreso povas fari, ke inter la homoj regu konkordo, paco, frateco. Ĝi sola faligos la interpopolajn barojn, forigos la antaŭjuĝojn pri kasto kaj silentigos la sektajn antagonismojn, instruante la homojn rigardi sin, unuj la aliajn, kiel fratojn, vokitajn al reciproka helpado kaj ne al tio, ke unuj vivu koste de la aliaj. ★



KARDEC, Allan. *La genezo*. Tradukis Affonso Soares. Rio de Janeiro: Brazilia Spiritisma Federacio, 2003. Ĉapitro XVIII, §§ 17-19

AMIKOJ DE LORENZ



Nia ĉi-numera **AMIKO** estas
ANATOLI IONESOV, el Uzbekio.

Li estas direktoro de "Internacia Muzeo
de Paco kaj Solidareco",
en la urbo Samarkando.

Li estas konstanta kunlaboranto
de **ALMANAKO LORENZ**, ano de UEA kaj
aktiva esperantisto
en la tuta mondo.

Gratulon, kara **ANATOLI**,
pro via fekunda laborado por nia afero!

VIVO

Se ni la vivon amas, ni do estu
Vivantaj eroj el Forĝej' vivanta!
Sed se la Morton ni dorlotas, ve
Al ni, estuloj, jam mortintaj mem!
Se ĉie Vivo movas l' universon,
Flagradas steloj, floroj bonodoras,
Treniĝas vermoj, vento blovas, rokoj
Fiere levas sian bruston, akvo
Falegas en abismojn, tondro ronkas,
Kaj fulm' trakuras nokton, kaj aŭroro
Sur horizonto ridas kaj salutas
La Teron vekigantan por laboro
En nova tago, por plugado nova,
– Ho, kiel dormas homo kaj rezignas
Sin mem kaj vivon, pensojn nur mallumajn
Nutrante, kvazaŭ estus li nenio?
Ho, la nenio! kio do terura
Ĝi estus, homo, via frat' malsaĝa?
Rigardu streĉe per okul' prudenta
La mondon teran, Spacon la senliman!
Anstataŭ eta vi pli bone estus,
En Kreajar' ampleksa kaj majesta,
Mem granda, granda kiel ĉio Dia!
Vi estas filo de plej alta Patro,
Kaj ne mizera vi sendube estus!
Se do la Patron amas vi, la Vivo
Jen antaŭ vi! Nu, kiel homo, vivu:
Nenie Morto – Vivo, VIVO ĉie!

LEO SOKOLOV

CARREIRO NETO, Luís da Costa Porto. *Mediuna Poemaro. Poemoj originale verkitaĵ en Esperanto, de pluraj aŭtoroj, mediume skribitaj. Arangiis la poemojn kaj tradukis la antaŭparolon A. K. Afonso Costa. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1972. p. 25.*

KUNLABORU! – Membriĝu ĉe
ASOCIO LORENZ kaj helpu la
divastigon de Esperanto kaj Spiritismo
en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro
da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilii
a divulgação do Esperanto e do
Espiritismo em todo o mundo!

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 39-a – n-ro 157 – Januaro-Februaro-Marto 2015

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2221-2269 - + 55-21-2450-4768
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



1891 – Al s-ro M.-V.

Ni uzas ordinare la formon “konatiĝi” (= fariĝi konato kun iu), sed ankaŭ la formo “koniĝi” estas tute bona (= fari sin koni ion). En la plena vortaro ni donis la vorton “krom”; sed poste, vidante ke kelkaj amikoj per la vorto “ekster”, kiu ekzistas en la malgranda fundamenta vortareto, kvankam sub iom alia senca nuanco, tute bone esprimas ankaŭ la sencon de “krom”, ni komencis ankaŭ uzadi tiun ĉi vorton en la senco de “krom”.

1891 – Al Guminskij

Tre estimata amiko!

Mi ricevis vian leteron kun la 9 rubloj, promesoj kaj uzitaj signoj de poŝto. Mi sendis al vi hodiaŭ la librojn, kiujn vi petis kaj ankaŭ la gazeton “La Esperantisto”, de n-ro 1 ĝis n-ro 12 de la pasinta jaro. La n-ro 1, 2 kaj 3 de la nuna jaro vi ricevos post 6-8 tagoj el Nurnbergo. De la sinjoro Molgaĉev mi ricevis antaŭ 4-5 monatoj leteron, tiam li ankaŭ petis librojn, kiujn mi sendis al li; sed de tiu tempo mi havas de li ankoraŭ nenian sciigon. Sinjoro Weber kredeble nenion faras por nia afero; antaŭ 5-6 monatoj mi skribis al li leteron, sed mi ricevis de li nenian respondon, mi havas de li nenian sciigon kaj ankaŭ inter la abonantoj de “La Esperantisto” mi lin ne trovas.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ




La 27-a kaj 28-a de Januaro realiĝis la 8-a BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ (BRES). La aranĝo havis lokon en la historia sidejo de Brazila Spiritisma Federacio, en la urbocentro de Rio-de-Ĵanejro, kun la ĉeesto de ĉirkaŭ 40 homoj. La ĉefa temo estis “ESPERANTO: PORDO AL LA HOMA KUNFRATIĜO”, pri kiu prelegis la kuracisto Elmir dos Santos Lima dum la malferma ceremonio. La sekvan tagon okazis la asembleo de BAES (BRAZILA ASOCIO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ). Poste, la eksa prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), Lício de Almeida Castro, prelegis pri la temo “Influo de Spiritismo je la homa progresado”. Elstaraj historiaj figuroj de brazila Esperanto-movado estis omaĝitaj de Eurípedes Alves Barbosa. La temo de lia prelego estis “Sur la vojoj de neforgeseblaj samideanoj”. Givanildo Costa, prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, prelegis pri la vivo de la fama brazila esperantisto Ismael Gomes Braga. Affonso Soares, direktoro de la Esperanto-fako de Brazila Spiritisma Federacio (sur la foto), prelegis pri temo kara al sia koro. Li parolis pri “La vivo kaj la verkaro de Yvonne do Amaral Pereira”. Oni anoncis, ke venontjare BRES havos lokon en la urbo Manaus, ŝtato Amazono. ★




Fontoj: – “Letero al BAES-membraro rilate al la 8-a BRES” – <http://esperantoilustrita.blogspot.com.br>

LORENZ 40-JARA



VOĈOJ
DE POETOJ EL LA SPIRITA MONDO



e la 15-a de Decembro 1975 fondiĝis SPIRITISMA ELDONA ASOCIO FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ. Omaĝe al ties 40-jara datreveno, bulteno KOMUNIKOJ publikigos specialajn artikolojn dum la tuta jaro. Ĉi-numere prezentiĝas la biografio de nia patrono.

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ. Naskiĝis la 24-an de Decembro 1872, en Zbislav, Ĉeĥio. Elkarniĝis la 24-an de Majo 1957, en Porto Alegre, Brazilo. Lerninte Esperanton, li verkis sian unuan libron pri la Internacia Lingvo, sub la titolo “Plena lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj”, en 1890.

En 1891, pro politikaj kialoj, li venis en Brazilon. Tuj post la alveno al Rio-de-Ĵanejro, laboris en orminejoj kaj kiel interpretisto. Translokiĝinte al la internlando de ŝtato Rio Grande do Sul, definitive loĝis en la urbeto Dom Feliciano, kie li edziĝis en 1894 kaj fondis familion, laborante kiel terkulturisto kaj instruisto.

Lia edzino estis s-ino Ida Krascheffski Lorenz, germanino, kiu al li naskis 10 infanojn, krom adopti 20 aliajn. Ŝi elkarniĝis en 1944, kaj li ree edziĝis, en 1949, kun s-ino Francisca Schumann Lorenz. De 1909 ĝis 1943 li estis instruisto en la lernejo, kiun li mem starigis en la urbeto. En 1950, li translokiĝis al la ŝtata ĉefurbo Porto Alegre.

Li estis poligloto, sciis dekojn da lingvoj kaj skribis centon da verkoj, originalaj kaj tradukitaj. Tre kompetenta esoteristo, li postlasis multenombrajn verkojn, kiuj disvastigas lian nomon kaj montras iom el lia rango de eminenta spiritualisto.

Menciinda estas lia “Diverskolora bukedeto”, Esperantaj poemtradukoj el 40 lingvoj. Kiel mediumo, li psikografie ricevis la verkon “Voĉoj de poetoj el la Spirita Mondo”. Grava ankaŭ estas lia lernolibro de Esperanto por portugallingvanoj, “Esperanto sem mestre” (= “Esperanto sen instruisto”).

Pro sia firmeco kaj alta spirita staturo, krom neskuebla fido de nelacigebla batalanto, li ĉiam alte tenis la flagon de laboro kaj frateco, de humileco kaj saĝo, malgraŭ la luktoj kaj oferoj, kiujn ne malofte li devis alfronti, kion tamen li ĉiam faris kun energio kaj ekstrema boneco.

Du jarojn post sia elkarniĝo, li diktis al la mediumo Francisco Cândido Xavier kelkajn mesaĝojn en la portugala lingvo, kiuj estis publikigitaj en la dulingva verko “O Esperanto como revelação” / “Esperanto kiel revelacio”. En tiu libro li pritraktas gravajn temojn pri la lingvaj baroj en la Spirita Mondo kaj informas pri la ekzisto de spiritaĵaj akademioj dediĉataj al Esperanto. ★

Fontoj:

XAVIER, F. C. *Esperanto kiel revelacio*. Diktita de la Spirito Francisco Valdomiro Lorenz. “Biografia skizo”, de Ney da Silva Pinheiro. Esperantigita de Benedicto Silva. Araras: IDE, 1988

– http://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_Valdomiro_Lorenz

ESPERANTISTAJ POETOJ

Emba

LIBERO

Ĉi vorton vi ne rajtas elparoli
simile al aliaj cent kaj cent,
dum la eldiro devas al vi boli
en la animo la plej sankta sent'.

Majeste sonu ĝi el via buŝo,
mistere kiel la revelaci',
aŭ korjubile kiel post akuŝo
la krio de patrina emoci'!

Ĝin ne diradu trive, ĝisagace:
en stalo ne konvenas diadem'.
Kaj se ĝin diras despotet' aŭdace,
la sankta vort' sanĝiĝos je blasfem'.

EMBA. *Ekzilo kaj azilo*. Poemkolekto originale verkita en Esperanto. Stafeto (Beletraj Kajeroj), 1962.

BARANYAI, Imre. (1902-1961). Hungaro, pli konata en Esperantujo per ties pseŭdonimo *Emba* (pro la Esperanta nomo EMeriko BARanjai). Multe kontribuis al la E-literaturo per poemoj k prozoj, originalaj k tradukitaj. Lia originala libro *Maria kaj la grupo* bildigas fidele la internajn trajtojn de la E-movado.



Humileco



Humileco, estante dia forto, lume reflektiĝas en ĉiuj kampoj de la Naturo, kiuj ja bildigas la Tronon de Dio, favorante progreson kaj renoviĝon. Kiu portas la laŭrojn de tiu preskaŭ ne konata virto, senĝene akceptas la devon labori kaj servi por la bono de ĉiuj, tiel ricevante la benon de la ekvilibro kaj konkretigante la manifestiĝon de la Diaj Leĝoj, kiuj neniam distrumpetas siajn donojn.

Humileco ne estas sklaveco. Ĝi estas super ĉio sendependeco, interna libereco fontanta el la profundaĵoj de la spirito kaj subtenanta lian konstantan renoviĝon por la bono. Kulturi humilecon signifas iri antaŭen sen kateniĝi; estas projekcii tion plej bonan el sia memo sur la vojojn de la mondo; estas forgesi ĉian malbonon kaj ĝoje rekomenci, en ĉiu tago, la taskon de amo.

XAVIER, F. C. *Penso kaj vivo*. Diktita de la Spirito Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis Affonso Soares. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 2000. Ĉapitro 24

EKSPozICIO PRI LA VIRINA TAGO

ASOCIO LORENZ partoprenis la ekspozicion de UNUIĜINTAJ NACIOJ pri la INTERNACIA VIRINA TAGO 2015, la 8-an de Marto, en Hiroshima, Japanio. Invitite de s-ino OSIOKA TAEKO (osioka@mua.biglobe.ne.jp), ni sendis la jenan mesaĝon, kiun oni publikigis kune kun aliaj el la tuta mondo:

Omaĝe al la Internacia Virina Tago, Spiritisma Eldona Asocio Francisco Valdomiro Lorenz, el Brazilo, brakumas ĉiujn virinojn el la tuta mondo, dankante al ili pro la sindonemo, laboro kaj amo. Ke Dio benu kaj protektu ĉiujn! Ricevu ĉi tiun mesaĝon el la Spirita Mondo kiel elmontron de nia kordanko:

Laŭdo al la Virino

*Kiam la Sinjoro estis agonianta sur la ligno,
Li vidis Marian kaj Johanon apud la kruco.
Tiam li diris al ŝi: – Virino, jen via filo.
Kaj ankaŭ al Johano: – Jen via patrino.
Per tiu parolo, li donis al la Virino benatan liberecon,
Ke ŝi formu kaj muldu niajn sentojn...
La Viro kreas en ni la energiojn de la Racio.*

*Sed la Virino en ĉiuj konstruas la Koron.
La Viro havas la sekreton de la Forto,
Kiun li alvokas al si kaj en si mem produktas kaj reproduktas.
Tamen, nur la Virino, pere de siaj sindonoj, simile al Homa
Anĝelo, povas konduki nin al la Ĉeesto de Jesuo.*

Maria. Dolores

XAVIER, F. C. *Chico Xavier, o referencial* (= Chico Xavier, la referenco). Uberaba: Grupo Espirita da Prece, 2010. Ĉapitro 6.



NOVA KLERISMO KAJ TOLEREMO

Renato Corsetti



ndo de malraciaj ideoj disvastiĝas tra la mondo. Neniu lando en la mondo ŝajnas sekura kontraŭ ili. Ili estas kaj de religia naturo kaj de nereligia naturo. Multaj homoj ankoraŭ disvastiĝas ideojn el malnovaj tradicioj pri la ekesto de la mondo kaj de la homo, kiuj ne eltenas racian ekzamenadon fare de kvin-jara bebo. Multaj, tute aparte en ekonomie evoluintaj landoj, disvastiĝas ankaŭ ideojn baze de mezepokaj mitoj pri supernaturaj estaĵoj, kiuj nuntempe regas en multaj filmoj aŭ en aliaj formoj de 'artaj' produktajtoj.

La apliko de tiuj malraciaj ideoj portas al krimoj kontraŭ la homaro malfacile akcepteblaj kaj de religiaj kaj de nereligiaj homoj kaj ĝenerale al pliigo de perforto en ĉiuj landoj de la mondo. Unu el la plej malraciaj ideoj

estas tiu de la ebleco de daŭra kresko de la ekonomio eĉ se la sekvo estas la malapero de la mondo mem pro ekologia katastrofo, kiu jam anonciĝas. Ni devas trovi novan ekonomian sistemon, kapablan kombini liberecon, justecon kaj fratecon.

Estas tempo kontraŭbatali la malracion per nova formo de racia klerismo. Ni ekiru de la tiamaj kleristoj de la 18-a jarcento kaj plukonstruu sur iliaj rezultoj. Ĉiu povas facile trovi en sia lingvo, kaj ankaŭ en Esperanto, verkojn de Voltaire aŭ de aliaj kleristoj. Kune kun klerismo iru 'toleremo' al aliaj kulturoj kaj pensomanieroj. Nur tiel oni povos kune antaŭeniri. Neniu insistu pri la absoluta vero de siaj pensoj, sed ĉiu kunkritiku siajn pensojn kaj tiujn de la aliaj. ★

BRAZILA AGO-TAGO

La 7-an de Marto, esperantistoj de EKOR (ESPERANTA KUNFRATIĜO DE LA OKCIDENTA REGIONO) okazigis surstratan informadon pri Esperanto en Rio-de-Ĵanejro. Centoj da propagandfolioj estis disdonitaj al la piedirantoj en grava komercejo, situanta en Bangu, grava kaj multehoma kvartalo de Rio. Partoprenis proksimume dek samideanoj, kiuj krom disdoni propagandaĵojn, elmetis Esperantajn publikigaĵojn kaj montris tabulojn kaj rubandojn. Tiu aranĝo estiĝis kadre de la tiel nomata "Brazila Ago-tago", kiu koincidas kun la komenco de la lerno-jaro en la tuta lando.

Fonto: <http://esperantoilustrita.blogspot.com.br>



EL LA EVANGELIO

Ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra. Jesuo – Mateo 6:3

La ne paradanta bonfarado havas duoblan meriton: krom materia karito, ĝi estas ankaŭ morala karito; ĝi ne tuŝas la ofendiĝemon de la komplezito; ĝi akceptigas la bonfaron, ne vundante la memamon kaj gardante la homan dignon. La vera karito estas diskreta kaj lerta per tio, ke ĝi kaŝas la helpon kaj sin detenas eĉ de la plej simplaj ŝajnoj, kiuj eble vundus, ĉar ĉiu morala ofendo pligrandigas la suferon naskitan de la bezono; ĝi scias trovi dolĉajn kaj afablajn vortojn, kiuj senĝenigas la ŝuldanton antaŭ sia bonfarinto, dum la fiera karito lin subpremas. La vera nobleco atingas sian superbelecon, kiam la bonfarinto, inversigante la rolojn, trovas rimedon por ŝajnigi, ke li mem estas ŝuldanto de la persono, al kiu li servis. Jen kion signifas jenaj vortoj: *Ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra.*

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo*. Tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. Ĉapitro XIII, § 3 – Fari la bonon sen parado